*Eldonnombro 13 000*

# LA KOMERCO

## Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio

Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4

Agentejoj en:

**Amsterdam, Atbara, Dublin, Funchal, Haguenau, Hvammstanga, Lisboa, Lodz, Pazarĝik, Sandakan, Semarang.**

La bulteno estas sendata al niaj agentoj kaj klientoj senpage, neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezone.

Numero 23 + Eldonita en marto 1936

# Fremdulvarbado per Esperanto.

La provo farita de la urbo Dresden en numero 22 de nia bulteno bone sukcesis. Vizitis Dresden konsiderinda nombro da Esperantistoj, avizis la alvenon pluaj, inter ili eĉ samideano el la malproksima Irano. La urbo Dresden tial denove donis anoncon. Gesamideanoj taksu ĝuste tiun decidon, ĝi estas en hodiaŭa tempo treege valora por ni germanaj Esperantistoj. Helpu per multnombra demando de prospektoj kaj per vizito de la bela Dresden, ke vi subtenas tiun paŝon de la urbo.

Ni hodiaŭ speciale invitas la gesamideanojn veturontajn al la Universala Kongreso en Vieno, resti kelkajn tagojn en Dresden. Okazos dum tiu tempo treege ĉarma, nepre vizitinda

**ĝardenkultur-ekspozicio**

en kies kadro estos montrataj la plej diversaj kulturaĵoj ĝardenkreskaĵaj, aranĝoj de luksaj kaj praktikaj ĝardenoj, entute ĉio kio povus doni instigojn al ĝarden- kaj floramantoj. En kunlaboro de la Germana Esperanto-Asocio kaj de la Loka Esperanto-Societo estas projektite aranĝi Esperanto-tagojn dum la antaŭkongresa tempo. Ni ne prezentos fortostreĉan programon, sed nur estos je dispono por gvidi vin tra la belaĵoj kaj vidindaĵoj de Dresden kaj ĉirkaŭaĵo. Sole unu oficiala aranĝo estas projektita, se sufiĉe multaj venos.

Kun la direkcio de la germanaj fervojoj ni sukcesis aranĝi ke la gesamideanoj, **restontaj almenaŭ unu tagon en Dresden kaj kiuj reveturos, ne pli frue ol post 7 tagoj, kunkalkulate la restado en Wien,** ricevos

rabaton de 20%.

Karto de Sassnitz al Bodenbach (ČSR-limstacio) kaj reen kostos rabatite nur

**RM 37.50 en tria klaso (rapidvagonaro).**

Gesamideanoj veturontaj de Königsberg tra Dresden ĝis Bodenbach ricevos eĉ 40%-an rabaton. La prezo de rabatita karto de Königsberg ĝis Bodenbach kaj reen estas:

RM 68.60 en dua klaso (rapidvagonaro),
RM 45.05 en tria klaso (rapidvagonaro).



**DRESDEN** la mirinde bela ARTURBO de Germanujo

atendas vin 1936 okaze de la

## REICHSGARTENSCHAU

(Regna ĝardenkultur-ekspozicio)

**24-a de Aprilo — 11-a de Oktobro.**

Proksimume 400 000 m² granda areo, meze de la belega parkpejzaĝo de la „Granda Ĝardeno". Grandaj specialekspozicioj en haloj kaj por floroj kreskantaj en libera aero. Rododendro-boskoj, ĝardenoj por farmantoj kaj vilaĝanoj, rozĝardeno, irisĝardeno, diversspeca ĝardeno, medicinplanta ĝardeno ktp. — Special-ekspozicio „La Poŝtmarko" 1.—16. 8. 1936. Ĉiutage koncertoj. Dancrestoracioj, kabareto, restoracio „Oberbayern" ktp.

Informoj k. prospektoj per: Verkehrsamt, Neues Rathaus kaj Dresdner Verkehrsverein, Hauptbahnhof (ĉefstacidomo) ambaŭ en Dresden.